

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Redaktoroj: S. Alberich - Jofrè, Delfi Dalmau, Marian Solà

LA SOLUCIÓ JUSTA

Ens tornem esperantistes. Comprenem cada vegada més la necessitat d'una forma de llenguatge que, sense perjudici de les diversitats nacionals i regionals, serveixi perquè tots els homes s'entenguin. A cada moment sentim a dir que convé expressar-se de manera que ho compreguin el més gran nombre possible d'homes. Partint d'aquest principi, s'arriba lògicament a la solució que presenta una parla internacional.

Cap dels idiomes d'avui, ni els grans ni els petits, ni els gloriosos ni els humils, ni els antics ni els nous, ni formosos ni lletjos, posseeix el do de la universalitat. Els uns tenen una major àrea que els altres. N'hi ha de reclusos dins els límits propis, i n'hi ha que saltant per damunt d'aquests límits són coneguts per altres homes de divers llenguatge nadiu. Però sempre hi haurà milers i milions d'homes que davant d'un text escrit en una llengua particular i fins en dues o tres o quatre llengües, es quedaran sense saber el que allò diu.

Si realment és desitjable i fins necessari que un text determinat sigui entès per tothom, en aquest cas no és lògic d'aturar-se en la solució eclèctica que representa l'ús dels idiomes de major àrea territorial. Més val anar a la solució completa, perfecta i definitiva, que consisteix a posar al costat de cada llengua materna una llengua auxiliar igual per a tots.

Tal hauria d'ésser la tesi de tots els que es presenten com a universalistes lingüístics. Els que ara propugnen, per a resoldre el problema, l'adopció d'algun dels tres o quatre idiomes que avui tenen una difusió més gran, haurien d'avenir-se per arribar a la solució única, que no pot ésser la d'un llenguatge dels que ara són parlats. La defensa de llurs deficients solucions podria confondre's amb l'esperit de privilegi idiomàtic. Es podria creure que volen, no solament facilitar les relacions lingüístiques entre els pobles, sinó afavorir unes llengües a costa d'unes altres.

Cal que l'universalisme lingüístic sigui desinteressat, és a dir, que no beneficiï particularment a cap llengua. Si es cau en aquest escull, ha de venir forçosament la competència entre els llenguatges que ocupen els primers llocs en les estadístiques d'idiomes. Al contrari, un llenguatge verament universal que serveixi, no per a l'ús interior dels pobles, sinó simplement per a la comunicació amb els que tenen una altra parla, no ofereix cap dels inconvenients al·ludits.

A. ROVIRA I VIRGILI

La Kaso de K. E. F. en la nova jaro

de la 1^a Januaro ĝis la 31^a Marto 1925

ENSPEZOJ

Saldo la 31 Decembro 1924	179'60 ptoj.
Donacoj	527'90 »
Vendo de K. E. pere de librejoj	3'15 »
Kvitancoj (kotizaĵoj kaj abonoj, enspezitaj).	925'— »
	<hr/>
	1.635'65 ptoj.

ELSPZOJ

Preso de «Kataluna Esperantisto»	813'80 ptoj.
Aliaj presajoj (cirkuleroj k. a.)	47'— »
Poŝtmarkoj, por sendo de K. E. kaj korespondaĵoj	95'10 »
Ĝeneralaj elspezoj	19'10 »
	<hr/>
	975'— ptoj.

RESUMO

Enspezoj	1.635'65 ptoj.
Elspezoj	975'— »
	<hr/>
Saldo la 31 Marto 1925.	660'65 ptoj.

Atentu, samideanoj, K. E. F-anoj. Ni devas ankoraŭ pagi al la Konstanta Repraesentantaro por niaj 400 membroj, naŭ numerojn plu de nia gazeto 1925, kaj aliajn. — Pagu vian kotizon, abonon, kaj helpmonon por ebligo de nia laboro por Esperanto.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro* Redakcio: Carrer València, 245 - BARCELONA

Radiotelefonia Parolado en Barcelona Stacio, pri la XII^a Kongreso kaj la XI^a Internaciaj Floraj Ludoj de la Kataluna Esperantista Federacio.

(daŭrigo)

Ni ankoraŭ devas prezentiĝi amase ĉien, por montri al ĉiuj ke Esperanto postvivis la krizegon, pli ĝuste, eble, la krimegon, de la granda milito. Ni montru ke nia idealo de komuna lingvo plej firme daŭras en nia cerbo, en nia koro, en nia lango kaj en niaj oretoj. Plej ofte ni aŭdigu kaj vidigu ke hieraŭa utopio fariĝis brila fakto, ĝojiga realo, logika afero dank' al genio Zamenhof.

En Majo proksima ni ĉiuj iru al Palma, kie atendas nin la balearaj fratotoj, kiuj volas pruvi ke ili deziris organizi kaj sukcesigi la XII^{an}. Kongreson de la Kataluna Esperantista Federacio kontraŭ ĉiuj baretoj kaj baregoj de timoj kaj jaluzoj, de trompoj kaj malkomprenoj. Sub la herooa kapitaneco de nia vera samideano Narciso Bofill grupiĝis kaj laboras la Palmaj Esperantistoj por sukcesigo de nia Kongreso, de la Internaciaj Floraj Ludoj, de ekskursoj plej allogaj, de festeno plej fratiga kaj de esperantismo plej sincera.

Dum la Kongreso estos ekzamenoj pri lernado, kapablo kaj profesoreco de Esperanto, por aljuĝo de la respektiva atesto aŭ diplomo al tiuj kiuj estos pruvintaj ke ili ĝin meritas. La instruintoj de Esperanto kiuj faras la

L'Esperanto és un idioma precís com el francès, harmoniós com l'italià i capaç com el grec.

Charles RICHET

kursojn ĉefe kaj ĝenerale nur pro fervoro esperantisma vidos premion kaj dankon ĉe la sukceso de siaj instruoj tra ekzamenoj; kaj la lernintoj de nia lingvo montros intereson pruvi ke ili estis fervoraj lernantoj, kaj ke ili deziras supreniri la ŝtuparon pruvan de kono elementa, meza aŭ supera pri la lingvo internacia. Ili suprenirintoj atingos la ĝojon bonvenigi kunulojn en atestitan lernintecon, kapablon aŭ profesorecon. Ekzamenoj de Esperanto estas do, ankaŭ festo en niaj Kongresoj.

La K. E. Fanoj plue devas interesigi pri niaj laborkunsidoj en kiuj la organizo de K. E. F. devas esti laŭeble plibonigata por certigi daŭrigon kaj sukceson de nia batalado, kaj nian helpon kaj kunlaboron al la Centraj Institucioj de nia Movado. La esperantistoj, kiuj konscias bonon kaj bezonon de Esperanto por la Homaro sentas la devon labori por la fina venko, kaj sentas plej grandan plenumi sian devon, kaj tial fariĝas ankaŭ festo la laborkunsidoj de nia Federacio.

Aliflanke ĉiuj samideanoj en la mondo kiuj havis la ŝancon ĉeesti la Vajn. Universalan Kongreso de Esperanto en Barcelona, bone memoras la ĉarmon kaj solenon de Festo de Floraj Ludoj, kun bela reĝino kiu akceptas ĉe sia trono en prezida altaro inter belaj korteganinoj kaj la urbaj aŭtoritatoj la premiitajn verkistojn, kiuj iras ricevi de ŝiaj moŝtaj manoj la premiojn kaj legi la plej belajn literaturajn pecojn.

Se vi deziras senti noblan emocion, ĉeestu feston de Floraj Ludoj. Se vi deziras ĝui ĝojan kunvenon, ĉeestu festenon de Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio. Se vi deziras admiri ravajn naturojn de tero kaj maro, veturu ekskursi al grotoj kaj kavernoj en Mallorca. Se interesas vin la historiaj postsignoj de la araba, greka, kaj romepoka civilizacioj vizitu la urbojn de la Mallorca insulo. Se vi ŝatas aŭdi la plej dolĉan akcenton de la kataluna lingvo aŭskultu porolojn de balearaj fraŭlinoj, de *belles attotes*.

Ŝajnas nur festaro tio, kion mi pridiras rilate al Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio. Ŝajnas festaro kaj estas festaro gajiga, ĝojiga; sed ĝi estas rezulto de grandaj klopodoj, de verkoj, verkigoj, lernigoj kaj lernoj, enspezoj, elspezoj, esperoj kaj eĉ malesperoj de redaktoroj de nia gazeto, komitatanoj de nia Federacio, organizantoj de la Kongreso, tio estas, de multaj samideanoj, kiuj, silente, konstante, en ombro dum tagoj, semajnoj, monatoj, batalas kontraŭ ĉiuspecaj batoj de l' sorto kaj moko de l' homoj, por oferi al Esperanto kaj esperantistoj festaron, Kongreson, por gloro kaj beno al nia Majstro kaj al liaj unuaj disĉiploj, kiuj ne havis la ŝancon vidi tiel proksima kiel ni la finan venkon de nia movado.

Memoru samideanoj, kaj pretiĝu veturi al Palma por restado feliĉa en lando de paco, insulo de ripozo, *Illa de la Calma*, kaj orita insulo, *Illa Dau-rada*. Ĝis la feliĉa renkontiĝo en Majo en Palma.

Kontribuaĵoj al Esperanta Etimologio

La etimologia literaturo de Esperanto bedaŭrinde ne estas vasta; krom la bona *Naŭlingva etimologia leksikono* de *L. Bastien*, Parizo 1907 (kiu cetere pli ol montri devenon kaj pradevenon de ĉiu vorto, celas montri la internaciecon de la Esp. radikoj), oni havas nur tie aŭ tie ĉi gazetartikoletojn.

En tiu ĉi verketo ni volas resume studi specialan ĉapitron de la Esperanta etimologio, kiu ĝis nun estas neniel pritraktita t. e. la komunaj (apelativaj) nomoj kiuj devenas de propraj nomoj.

La studado de tiuj ĉi vortoj havas tute apartan intereson por la problemo mem de la tiel dirata «arbitra» pliriĉigado de la naciaj lingvoj. Jam la fama lingvistikisto H. Schuchardt, en sia raporto pri Internacia Lingvo ĉe la Viena Scienc-Akademio.

«Bericht über die auf Schaffung einer künstlichen internationalen Hilfssprache gerichtete Bewegung» *Almanach der Wiener Akademie der Wissenschaften*, 1904, kaj, antaŭ nemulte, lia konata kolego s-ro. Setälä en sia parolado pri «La mondlingva problemo».

Legita ĉe Helsinka kongreso kaj publikigita en Ĝeneva ESPERANTO spt. 1922, altiris la atenton de la mondlingvanoj pri la libervola (t. e. arbitra) kreado de kelkaj vortoj (*gaso* k. simile) kaj ilia enkonduko en la tiel nomatajn «naturajn» lingvojn.

La serio de nomoj kiujn ni citas estas iom simila: ĉiu el ili naskiĝis pro metaforo aŭ metonimio, kiu estas certe unuafoje uzita de iu persono difinita (kvankam malofte, laŭ niaj konrimedoj, difinebla), kaj kiu nur poste, pli malpli rapide, etendiĝis al tuta lingvo aŭ, ofte, al ĉiuj Eŭropaj lingvoj.

Ili estas do iu rimedo por mezuri la influon de individua agado sur tiu kolektiva afero kiu estas lingvo, kaj tial iu pruvo ke la lingvo ne estas, kiel kredis la Romantiko, senkonscia kreaĵo de la Popolo, sed, almenaŭ parte, ĝi konsistas el kreaĵoj de izolaj individuoj, poste akceptitaj de la parolantaro.

Kompilante tiun ĉi liston ni intence evitis multoblan citadon de lingvistikaj verkoj; sed ni zorge konsultis la fundamentajn etimologiajn librojn.

Diez, Körtin, Meyer-Lübke por la latinidaj lingvoj, (kaj speciale Halzfeld-Darmesteter-Thomas por franca); Walde por latina, Boisacq por greka; plue Skeat, Murray por angla, Kluge por Germana, Berneker por slavaj lingvoj, kaj la specialajn verkojn pri tiu ĉi temo en la Eŭropaj lingvoj.

G. Krüger, *Eigennamen als Gattungsnamen*, Berlino 1891. J. Reinius *On transferred Appellations of human beings*, Göteborg, 1903. J. Baudisch, *Über Eigennamen als Gattungsnamen im Französischen*, Vieno 1905-1906. A. Kölbl, *Eigennamen als Gattungsnamen*, Leipzig' 1907. K. Nyrop «Noms propres» en *Grammaire historique de la langue française* Kopenhavn' 1913

Ni konsideras nur la vortojn enhavatajn en la Fundamenta Vortaro aŭ en la 3 Oficialaj Aldonoj.

Aliaj kompreneble ĝustus troveblaj en bonaj vortaroj aŭ uzeblaj laŭ la 15^a Fundamenta Regulo: *Alensono, Nestoro, Vandalismo* k. t. p. kiuj devenas de nomoj propraj: personaj, lokaj aŭ gentaj.

Ankaŭ diaj kaj heroaj (mitol.)

Nestuditaj estas la vortoj, kiuj ne havis evoluon de propra al komuna nomo, sed kies signifo estas aŭ estis duba inter propra kaj komuna: ekz. *Dio* (kaj *adiaŭ*; *teismo, teisto, ateismo, ateisto*), *Madono, demono, satano, diablo, anĝelo, kerubo, serafio; ciklopo, titano; muzo*, (k. *muzeo, muziko, mozaiko*); *iriso, hiacinto, narciso; cinika, stoika; Edeno, Paradizo, Infero; biblio, korano, talmudo* ktp.

En la naturaj lingvoj estas cititaj nur la formoj kiuj plej bone helpas resupreniri ĝis la etimologio.

La mallongigoj uzitaj estas la kutimaj: *fr.* = franca; *lat.* = latina ktp. *scienciat.* = scienca Latino, moderna Latino de scienculoj (botan., zool. ktp.); Asterisko (*) montras vortojn supozeblajn, sed ne dokumenteblajn.

akademio: lat. *Academia*, gr. *Ἀκαδημία* skolejo de Platono, en loko dediĉita en Ateno al greka heroo *Akademio*.

alabastro: lat. *alabastrum*, laŭ egipta urbo *Alabastron* (Plinio)?

amoniako: scienciat. *ammoniaca*, laŭ adjektivo *ammonicus* «rilatanta al templo de *Jupitero Ammono*» en Libio.

arbesko: «ornamaĵo... laŭ la *araba* gusto» (Kabe)

ardezo: it. *ardesia*, de irlanda urbo *Ardes*? (Diez)

arlekeno: fr. *arlequin* de it. *Arlecchino*, itala masko aperinta unuafoje en Parizo, kies nomo estas prenita de antikva franca *Hellequin*, iu diablo aŭ koboldo de mezepoka folkloro kaj literaturo (M. Rühlmann, *Etymologie des wortes Harlequin und verwandter Wörter*. Halle 1912).

Aŭgusto: lat. *augustus*, laŭ la nomo de la imperiestro *Augusto* (antaŭe *sextilis*).

Avelo: lat. *nux avellana*, laŭ *Avella* aŭ *Abella*. suditala urbeto.

Bajoneto: fr. *baionnette*, laŭ franca urbo Bayonne, kie la armilo estas unue fabrikita.

baldakeno: fr. *baldaquin*, de it. *baldacchino*, antikve adjektivo laŭ *Baldacco*, t. e. *Bagdad*'.

batisto: fr. *batiste*, laŭ la nomo de la unua fabrikinto (Cambrai, XIII jar.c.)?

bronz: it. *bronz*, verŝajne de ant. lat. *Brundisium* nomo de suditala urbo *Brindisi*.

caro: rus. *царь* (*cari*), de lat. *Caesar*, titolo fariĝinta, jam de la komenco de la Roma imperio, sinonimo de «imperiestro», pro sinsekvaj adoptadoj de la tronheredontoj en la familion de Cezaroj.

ceremonio: lat. *caerimonia*, laŭ etruska urbo *Caere*?

cidonio: lat. *cydonia*, laŭ kreta iama urbo *Cidonio*.

- ĉampano*: fr. *champagne*, laŭ franca regiono *Champagne*.
- ĉerizo*: fr. *cerise*, de lat. * *ceresea*, *cerasea*; *cerasus*, gr. *χάριξρος*, verŝajne laŭ urbo *Kerazunto* sur Nigra maro, konkirita de Lukulo en 73 p. Kr.
- dalio*: scienciat, *dahlia*, laŭ nomo de sveda botanikisto Dahl, importinta ĝin de Meksiko en 1789.
- damasko*: it. *damasco*, laŭ Siria urbo *Damasko*.
- dando*: angl. *dandy*, laŭ skola formo de la nomo *Andrew (Andreo)*?
- dolaro*: v. *talero*.
- ermeno*: fr. *hermine*, scienciat, *putorius herminea*, laŭ devenregiono *Armenio*.
- fajenco*: fr. *faïence*, laŭ itala urbo *Faenza*.
- fazano*: lat. *phasianus*, laŭ rivero *Phasis* en *Kolkido* sur Nigra Maro.
- fiakro*: fr. *fiacre*, ĉar la unuaj tiaspecaj veturiloj estas luitaj (1640) en Pariza *Hôtel St. Fiacre*, domo kie estis religia bildo de Sankta Fiakro.
- franko*: fr. *franc*, laŭ la vortoj N. N. Rex Franc. (rex Francorum = reĝo de la Frankoj aŭ de la Francoj), legeblaj sur antikvaj francaj moneroj.
- gardenio*: scienciat. *gardenia* (Linné), laŭ skota botanikisto Garden (XVIII jarc.)
- gazo*: fr. *gaze*, laŭ Palestina urbo *Gaza*?
- gilotino*: fr. *guillotine*, laŭ la eltrovinto, d-ro. Guillotin (1789)
- groggo*: angl. *grog*, laŭ la eltrovinto admiralo Vernon, alnomita *Old Grog* (1745)
- ĝeni*: fr. *gêner* (antikve signifanta «turmentegi»), verŝajne laŭ *Geenna*, valo apud Jeruzalemo, ofte citata en la Biblio, kien oni ĵetis la kadavrojn de la kulpuloj.
- ĝino*: v. *junipero*
- hermafrodito*: de mitologia ambaŭseksulo *Hermaphroditus*, naskiĝinta de Merkuro (gr. *Ἑρμῆς*) kaj de Venuso (gr. *Ἀφροδίτη*).
- hortensio*: scienciat. *hortensia*, laŭ sinjorino Hortense Lepante (XVIII jarc.)
- jako*, *jaketo*: fr. *jaque*, *jaquette* laŭ fr. nomo *Jacques*, tre ofta inter kamparanoj?
- januaro*: lat. *januarius*, laŭ la nomo de dio *Januso*.
- juglando*: lat. *juglans*, t. e. *Jovis glans* «glano de Jupitero»
- julio*, lat. *julius*, laŭ la nomo de *Julio Cezaro* (antaŭe *quintilis*)
- junio*: lat. *junius*, laŭ la nomo de diino *Junono*.
- junipero*: lat. *juniperus*, ĉu de * *Junonipiros* «Junonfrukto»? Tra angla ĝin, *junipero* fariĝis ankaŭ *ĝino*, «junipera brando» (Kabe).
- ĵaŭdo*: fr. *jeudi*, lal. *Jovis dies*, «tago de Jupitero».
- kalikoto*: fr. *calicot*, laŭ hinda (Malabara) urbo *Calicut*.
- kamelio*: scienciat. *camellia*, laŭ Moravia Jezuito *Camelius (Kamel)* (XVII jarc).
- kanario*: hisp. *canario* «birdo de Kanariaj Insuloj»
- kanibalo*: hisp. *canibal*, alia formo de la nomo de *Karaiboj*, gento de Antiloj.

kastoro: lat. *castor*, gr. κάστωρ Iu sekrecio de la besto estis uzata por virinmalsanoj, kaj tiuj ĉi estis sub protekto de *Kastoro*, unu el la du *Dioskuroj*: pro tio la nomo de la besto devenas de tiu de la dio.

kolofono: lat. *colophonia*, de greka urbo *Kolofono*.

kravato: fr. *cravate*, importita en Francujon de regimento de *Kroatoj*, dum tridekjara milito.

kupro: lat. *cuprum*, ankaŭ *aes cyprium*: «Cipra bronzo».

labirinto: gr. Λαβύρινθος, konstruaĵo en Kreto kie loĝis legenda Minotaŭro.

lundo: fr. *lundi*, lat. *lunae dies* «tago de la luno» aŭ, pli bone, «de Luno».

magneto: lat. *magnes, lapis Magnes*, gr. Μάγνητ «Magnezia ŝtono» de urbo *Magnezio*, sur rivero Meandro.

makadamo: fr. *macadam*, angl. *macadamise*, laŭ eltrovinto, la skota inĝeniero John Macadam (1819).

majoliko: it. *maiolica*, laŭ la malnova formo de la nomo de insulo *Majorko*.

mansardo: fr. *mansarde*, laŭ franca arkitekto François Mansard (XVII jarĉ).

mardo: fr. *mardi*, lat. *Martis dies* «tago de dio Marso»

marioneto: fr. *marionette* «pupo», antikve «bildo de la Madono» t. e. *Mario*)

marokeno: fr. *maroquin*, laŭ Maroko.

marto: lat. *Martius* (mensis) «monato de dio Marso»

maŭzoleo: lat. *Mausoleum*, gr. Μαυσωλεϊον, tombejo dediĉita de la edzino al Karia reĝo *Maŭzolo*; ĝi estis unu el la sep mirindaĵoj de la mondo.

mazurko: pol. *mazurka*, balo laŭ Mazuriaj moroj.

meduzo: scienciat. *medusa*, (Linné), laŭ la kapo — simile aspektanta — de mitologia *Meduzo*.

mentoro: fr. *mentør*, laŭ la nomo de *Mentoro*, la fidela konsilanto de Telemako en Odiseo kaj precipe en *Aventures de Télémaque* de Fénelon (1699).

merkredo: fr. *mercredi*, lat. *mercuri dies* «tago de dio Merkuro».

mirabelo: fr. *mirabelle*, laŭ sudfranca urbeto *Mirabel*.

mono: angl. *money*, lat. *moneta*, laŭ latina alnomo de Junono (*Juno Moneta*), ĉar monfabrikejo en antikva Romo estis apud ŝia templo.

muslina: fr. *mousseline*, laŭ Mezopotamia urbo *Mosul* .

nankeno: fr. *nankin*, laŭ ĉina urbo *Nankiŝ'* .

nikelo: nomo donita al la metalo de Svedo Cronstedt (1754), laŭ *Nicker Nick*, nordmitologia koboldo, kies antikva nomo verŝajne miksiĝis kun derivaĵoj de *Nikolao*.

nikotino: scienciat. *nicotina*, laŭ Johano Nicot, franca ambasadoro en Lisbono, kiu portis unuafoje tabakon al sia reĝino en 1560.

nizo: scienciat. *nisus*, laŭ nomo de Megara reĝo *Nizo* (*Nisus*) transformita, laŭ la mitologio, en la nomita birdo.

palinuro: scienciat. *palinurus*, laŭ nomo de *Palinuro*, piloto de *Eneo*.

pamfleto: angl. *pamphlet* (aperanta en XIV jarĉ.), verŝajne ĝeneraligita uzado de nomo de mezepoka verketo *Pamfilo aŭ pri Amo* (treege konata dum XIII-XIV jarĉ.).

pantolono: fr. *pantalon*, vestaĵo de itala masko *Pantolono* (XVI jarĉ.), maljunulo saĝa kaj iom avara. Unue la masko estis simbolo de Venecianoj. ĉe kiuj la nomo *Pantolono* estis tre ofta.

paskvilo: germ. *Pasquill*, de itala *pasquillo* (poste *pasquinata*), satiro afiŝata al statuo de Pasquino en Romo (XVI jarĉ.).

peonio: scienciat. *paconia*, laŭ *Paeon*, gr. Παιών, alnomo de Apolono, pro ĝiaj supozitaj medicinaj kvalitoj.

pergameno: lat. *pergamena*, t. e. skribmembrano el Pergamo ĉefurbo de Mizio (en Malgrandazio), kie pergameno estis eltrovata.

persiko: lat. *persica*, *persicum malum*, «persa frukto», pro ĝia devenloko.

pigmeo: lat. *Pygmaeus*, gr. Πυγμαίωζ, laŭ Etiopia legenda popolo de tre malgranda kresko.

pistolo: it. *pistola* revolvero (antikve ponardo) fabrikita en Toskana urbo «*Pistola*»

polko: pol. *polka* «pola balo» (kp. *mazurko*).

pulĉinelo: it. *pulcinella*, laŭ nomo de masko *Pulcinella*.

punca: fr. *ponceau*, laŭ **punicellus*? (lat. *punicus* ruĝkolora; ĉar Fenicoj kaj Kartaganoj — *Poeni*, *Punici* — produktis kaj importis purpuron en Romon).

rabarbo: lat. *rhabarbarum*, laŭ antikva skita nomo de rivero *Volga* (Rha. gr. Ρῶζ)

romano, *romanco*, *romantiko*, diversaj produktajoj de latinida (t. e. novromana) literaturo kaj vivo: v. precipe G. Paris en *Romania* I 1-22; P. Voelker en *Zeitschr. für rom Philologie* X 485-525.

sardelo: it. *sardella*, lat. *sardina*, gr. σαρδίνη «sardinia fiŝo»

sifilito: scienciat. *syphilis*. laŭ latina poemo *Syphilis, sive Morbus Gallicus* (1530) de itala kuracisto G. Fralastoro: la protagonisto *Syphilus* suferas je la nomita malsano.

silueto: fr. *silhouette*, laŭ la nomo de franca finanĉkontrolisto E. de *Silhouette* (1759), ĉu pro tio ke li eltrovis tiun bildmanieron, ĉu pro lia granda ŝparemo (aplikita al malmultekostaj bildoj), ĉu pro lia efemera ministreco.

sklavo: mezep. lat. *slavus*, *sclavus* t. e. «Slavo». Slavoj estis ofte vendataj kiel sklavoj en Okcidento je la fino de la unua jarmilo p. K.

ŝovinismo: fr. *chauvinisme*, laŭ *Nicholas Chauvin*, soldato dum la Revolucio kaj la unua Imperio, prezentata en komedio de Scribe.

ŝovinisto: fr. *chauviniste*, v. supre.

ŝrapnelo: angl. *shrapnell*. laŭ nomo de angla artilerigeneralo samnoma (1825).

talero: germ. *T(h)aler* (kaj *dolaro*, angl. *dollar*), de *Joachimstaler*, moneo presita en *Joachimstal* en Bohemio (1519).

tarantelo: it. *tarantella*, danco iom simila, pro ĝiaj rapidaj movoj, la konvulsiojn de homoj morditaj de *tarantulo* (v.).

tarantulo: scienciat. *lycosa tarantula*, laŭ suditala urbo *Taranto*.

turkiso: germ. *Türkis*, it. *turchese*, «Turka ŝtono.»

uragano: it. *uragano*, hisp. *huracán*, laŭ Amerika diaĵo *Huracan*.

utopio: laŭ fantazia insulo *Utopio* (*Utopia*: gr. *ὄψ* *ne*: *τόπος* *loko*), priskribita de angla verkisto kaj ministro T. More (1518).

vendredo: fr. *vendredi*, lat. *Veneris dies* «tago de diino *Venuso*».

veneno: lat. *venenum*, antikve «magia trinkaĵo», laŭ nomo de diino *Venuso*, «amtrinkaĵo».

verdigro: fr. *vert-de-gris*, antikve *vert-de-Grice*, t. e. «Greklanda verdaĵo.»

vulkano: it. *vulcano*, laŭ nomo de insuleto *Vulcano*, kiun la antikvuloj kredis restadejo de dio *Vulcano*.

zuavo: fr. *zouave*, laŭ kabila gento, kiu donis la unuajn soldatojn al la franca tianoma korpuso.

BRUNO MIGLIORINI

Premiita ĉe la Xaj. Internaciaj Floraj Ludoj

Fajreroj

Internacia Konferenco por Uzo de Esperanto en Komenco kaj Industrio okazos la 14-17an de Majo 1925 dum la Foiro de Paris kiu unnafoje estos internacia. La Konferenco estas protektata kaj monhelpata de la Paris-a Komerca Ĉambro, de la foiro de Paris kaj de gravaj komercaj firmaoj kaj personoj. Ĉiuj Komercaj Ĉambroj kaj Foiroj estis invitataj kaj multaj jam aliĝis kaj sendos delegitojn. Ĉiuj komercaj grupoj kaj personoj rajtas peti invitil ojn. Kiel praktika eksperimento, en la Foiro de Paris, la Halo de la Moderna Oficejo (Hall du Bureau Moderne) enhavos plurajn ekspoziciejojn en kiuj deĵoros oficistoj parolantaj Esperante. Estas dezirinde ke ĉiuj Esperantistoj kiuj vizitos Paris-on dum Majo iru al la Halo de la Moderna Oficejo en la Foiro de Paris kaj petu informojn Esperanto. — ESPERANTO ET COMMERCE, 20 r de l'Arc-de-Triomphe, PARIS 17 e

Barcelona Radiotelefonio Esperanta Sukceso. — La inteligenta inĝeniero kaj membro de la direktanta komitato de «Radio Barcelono» sinjoro Guillén, ĉeestos, kiel oficiala reprezentanto de Hispana Registaro, en la «2.^a Eŭropa Konferenco internacia pri Radioaŭdigado», kiu okazos la 3^{an}. de aprilo en Genevo, alvokita de la Sekretario de la Societo de Nacioj. La esperantaj provoj faritaj en la Barcelona Stacio varbis S-ron. Guillén al nia kara lingvo, kaj certe li voĉdonos favore ĉiujn demandojn, kiuj rilatos Esperanton. — Ĉe la unua konferenco, okazinta en la pasinta jaro, oni aprobis kelkajn konkludojn, publikigitajn en franca lingvo kaj tradukitajn al Esperanto; per unu el tiuj konkludoj oni petas la radioaŭdigantajn staciojn, ke ili bonvolu aŭdigi regule paroladojn kaj kursojn de Esperanto. — «Radio Barcelona» helpe de K. E. F. kaj de S-ro. Guillén, plenumas tiun peton, ĉar komence de la 1^a de aprilo, ĉiumerkrede je la naŭa vespere, laŭ ni diras en alia fajrero, S-ro. Domènech gvidos esperantan kurson por komencantoj: sinsekve klarigos alian praktikan kurson de Esperanto S-ro. Dalmau, kaj poste S-ro Grau, fraŭlino Castellvi k. a. ankaŭ partoprenos en tiu radia propagando.

PALMA DE MALLORCA



Urbodomo de Palma



Korto de la Domo de la Marquizo de Vivot

Programo de la XII^a Kongreso de K. E. F.

21-24 de Majo de 1925 — Palma de Mallorca

UNU A TAGO

Matene: Alveno de la gekongresanoj — Prezento de la akceptejoj por la disdonado de la gvidlibro kaj Kongresinsigno. — Vizito al la Aŭtoritatuloj. — Solena Meso kun esperanta prediko. — Malferma kunsido de la Kongreso.

Posttagmeze: Labora kunsido de la Kongreso. — Ekzamenoj.

D U A TAGO

Matene: Ferma kunsido de la Kongreso. — Festo nomita «Floraj Ludoj»

Posttagmeze: Oficiala Festeno. — Koncerto.

Vespere: Kantaŭdaĵo de *Orfeo Mallorquí*.

T R I A TAGO

Matene: Vizito al la urbo, al ĝiaj monumentoj, muzeoj k. c.

Posttagmeze: Vizito al la ĉirkaŭaĵoj de la urbo.

K V A R A TAGO

Ekskurso al la famaj kavernoj Manacor.

Post la Kongreso oni povas efektiviĝi diversajn tre allogajn ekskursojn, nome: Al Sóller; al Valldemossa, Miramar, Deyá kaj Sóller; al Toront de Pareis; al la Monaĥejo de Lluch; al Pollensa; al Andraitx, Estalenchs, Banyalbufar kaj Esporlas. Ĉiun el tiuj ĉi ekskursoj oni povas efektiviĝi en unu tago.

Kondiĉoj de «Empresa Soler» por la kongresanoj:

Prezoj por nur irrevena marveturo Barcelona-Palma:

En 1 ^a klaso	ptoj. 95'—	2 ^a klaso	ptoj. 60'—
» 3 ^a »	» 33'—	4 ^a »	» 19'50

Prezoj por irreveno, dumkongresaj loĝado kaj ekskursoj:

1 ^a klaso	ptoj. 195'—	2 ^a klaso	ptoj. 125'—
3 ^a »	» 85'—	4 ^a »	» 70'—

Tiuj specialaj prezoj estas por limigita nombro da: 30 enskribiĝintoj por 1^a klaso; 30 por 2^a, kaj 40 por 3^a; escepte por 4^a klaso kies nombro estas senlima kaj la veturo sur la ferdeko.

Ni atentigas, do, ke ĉiuj volantaj profiti la specialajn kondiĉojn de la tri limigitaj klasoj rapidu enskribiĝi sin.

Por enskribiĝo sendu plej baldaŭ minimume 10 ptojn. kiel garantion al la jena adreso: Liceu Dalmau, carrer València, 245, Barcelona. La monon sendu per poŝtmandato aŭ bankbiletoj.

Forvetura enŝipiĝo en Barcelona: la 21 Majo je la 8'30 vespere.

Revena enŝipiĝo en Palma, la 24-5 Majo je la 8'30 vespere.

Alveno la morgaŭan tagon je la 7^a matene.

Kongresaj sciigoj

Grupaj Standardoj. — La O. K. insiste petas al la Grupoj, ke ili kunportu siajn standardojn. Ju pli multaj standardoj flagros tra la urbo, des pli efikos la Kongreso ĉe la Palmano.

Salutado de delegitoj. — Kiel kutime, delegito de ĉiu esperanta societo salutos la Kongreson dum la Malferma Kunsido, tuj post la parolado de la prezidanto.

Ekzamenoj. — Por faciligi ilian aranĝon, la ekzamenotoj bonvolu sin anonci kiel eble plej baldaŭ al la O. K. Oni devos pagi la kutiman sumon por la diplomoj de *kapableco* kaj *profesoreco*.

Kongreskarto. — La O. K. presigis specialan karton por la kongresanoj. Por ricevi ĝin estas nepre necese ke ĉiuj partoprenontoj sendu tujan alian al la prezidanto de la O. K., Sro. Narciso Bofill, Sindikato 188, Palma de Mallorca, kiu estas senpaga por K. E. Fanoj, kaj kostas nur 5 ptojn. por aliaj samideanoj.


Kongreslibro kaj insigno. — Ĉiu kongresano ricevos ĉe la Akceptejo la kongreslibron kaj insignon kontraŭ prezento de la ĝustatempe petita kongreskarto.

Labora Kunsido. — Ĝi okazos laŭ la jena tagordo: sekretaria raporto, aprobo de bilanco, disku tode prezentitaj proponoj, elekto de komitatanoj kaj akcepto de kongresurbo por 1926. — Ĉiu federaciano portu kun si la kvitancon 1925 por eventuala voĉdonado. La diversaj grupoj aliĝintaj kaj pagintaj la federacian kotizaĵon ricevos ĝustatempe la diversajn kvitancojn.

Oficiala Festeno. — Ĉeestontoj enskribiĝu antaŭ la 15 de majo. Oni sendu la enskribon al Sro. Bofill.

Antaŭvido. — Tiuj feliĉaj kamaradoj kiuj povos veturi al Palma por ĉeesto pli longa ol la oficiale kvartaga Kongreso estas petataj por faciligo de veturo kaj loĝado iri al Palma antaŭ la 21 de Majo.

PALMA DE MALLORCA



Korto de la Domo Oleo



Haveno de Palma

XI^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj

Listo de verkoj ricevitaj (fino)

36. Laŭ la maniero de Rubén Darío. — 37. Pli da aferoj troviĝas en ĉielo kaj sur tero ol filozofio klarigas. — 38. Majfloro. — 39. Maltrankvilo. — 40. Quare fremuerunt gentes...?. — 41. Fjodor. — 42. Fundamento kaj fideleco. — 43. Natura. — 44. Noktmeza batalo. — 45. Ami... ami... ami! — 46. La patrujo super ĉio. — 47. Komuna sorto. — 48. Larmiĝinta ĝojo. — 49. Se la polvohomo meditas. — 50. Ĉiela graco-hora paco. — 51. Se socio pekas, amo krimas. — 52. Rememoroj. — 53. Malofta temo. — 54. Fata Morgana. — 55. Mimemo. — 56. Sankta vesper', paca vesper'. — 57. Supreh la kapon! — 58. Arbara silento. — 59. Vi estas prava, etulo. — 60. Laboro de l'mano - de l' koro la sano. — 61. Beninda malsato. — 62. Obstupescite celi.! — 63. Ŝanĝemeco. — 64. Vojo, Vereco kaj Vivo. — 65. Lori. — 66. Ŝajni kaj esti, jen diferenco. — 67. Fortuno favoras kuraĝulon. — 68. Kio komenciĝas devas nepre finiĝi. — 69. Pekoj de patro persekutas idon. — 70. La bonuloj el ĉiu nacio havas lokon en Paradizo. — 71. La vivo estas sonĝo, kaj la amo la suno de eterna maja tago. — 72. Vian ĉielon kovru, Zeŭs!. — 73. Plaĉi al ĉiuj neniu sukcesis. — 74. Tra l'mondo sonoru la vortoj de Hafis. — 75. Kiom da kapoj tiom da ĉapoj. — 76. Ex abundantia cordis... — 77. Kiel ĵusnasko al glor' Mortinto. — 78. Al ruĝa kruco. — 79. Priskribaj sonetoj. — 80. Kisu sed kore. — 81. Al senmakula Mario. — 82. Du jaroj pasigitaj en pensiulejo estas la plej bona bazo de la edukiteco. — 83. Parolantaj ŝtonoj. — 84. Ridanta vizaĝo. — 85. Libere spiri ne signifas vivi. — 86. Trosevereco estas fiereco. — 87. Turbano kaj duonluno. — 88. Eĉ la naturo parolas esperante. — 89. Canigó. — 90. Rondalla del Vallespir. — 91. Silento estas oro. — 92. Amor omnia vincit. — 93. Sóc al país dels tarongers florits. — 94. De quan les bèsties paraven. 95. Vindicamus hereditatem patrum nostrorum. — 96. Konsolo. — 97. Valoraj pensoj. — 98. Amo diverse komprenita. — 99. Mi amas frenezulojn. — 100. Malamikete de las nacjes Kadó, kadó, jam temp'está... — 101. Ad pédem litteram. — 102. Per esperanto al repaciĝo kaj konkordo. — 103. Hundo kiu bojas ne... — 104. Herooj sen patrujo. — 105. La Fianĉino de la Morto. — 106. Konstantinopolo. — 107. Asonancoj. — 108. Els ulls són l'espill de l'ánima. — 109. No hi fa res que m'enganyis. — 110. Patrino kaj infano. — 111. Amo - plej supera rajto.

VERDIKTO. Nia maja numero publikigos la verdikton.

DANKON sinceran al la diversaj gazetoj, kiuj bonvolis represigi la Alvokon al la XI-aj. Internaciaj Floraj Ludoj.

Ĉi-tiu numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

Antaŭparolo al lernolibro*)

La problemo pri internacia lingvo ne estas pure «lingvistika», sed ankaŭ, kaj eble precipe, «socia». La perfekteco tie ĉi sidas malpli en la lingvo mem, ol en la plena akordo de tiuj, kiuj ĝin uzas.

Krei universalan lingvon *a priori*, postulus unue — se tia kreado estas io alia ol simpla ludo — detalan, zorgan, precizegan klasifikadon de la homaj scioj, kies esprimilo estus tia lingvo. Sed tiu ĉi klasifikado malproksimiĝas des pli, ju pli vastiĝas la kampo de la scienco, ju pli multiĝas sur tiu ĉi kampo novaj vojoj, kiuj siavice disdividiĝas en disvojoj, ĉu inter si paralelaj, ĉu interplektitaj

Unu el la meritoj de D-ro Zamenhof estas, ke li tute alimaniere komprenis la problemon kaj ke ĝian solvon li serĉis *a posteriori*. Li ne kreis lingvon: li eltiris la elementojn de sia lingvo el la jam ekzistantaj lingvoj, kies sintezo ĝi estas. Se ni komparas la lingvojn kun fortoj, lia lingvo estas la «rezultanto» de tiuj ĉi fortoj.

Sed, kial li tiamaniere konsideris la demandon? Tial ke, anstataŭ serĉi ian lingvon por la plezuro ĝin kombini pli malpli sukcese, li serĉis antaŭ ĉio, super ĉio, aŭ pli ĝuste, li serĉis *nur* traduki senpere la ideojn, kiuj plenis lian animon, tiel ke lin komprenu la plej eble granda nombro da homoj, liaj «fratoj». El la koro venas la altaj pensajoj. Tiujn ĉi grandanimajn pensajojn, tiun ĉi profuundan amon al la homaro, tiun ĉi ardan deziron alproksimigi la regnon de la paco, ĉion tion ĉi li volis, per ĉiuj siaj fortoj, konigi, komuniki al ĉiuj, kiaj ajn estus iliaj diversaj lingvaĵoj. Por li la lingvo estas *nur ilo*; sed precize el tio konsistas la intima originaleco, la eksterordinara indeco de la lingvo, tiel ke — ilo forĝita por difinita celo: praktika utiligado — ĝi tuj kaj plene taŭgas. La perfekteco de ĝi ajn instrumento kuŝas ja en la perfekta adaptado al ĝia funkciado, kiun ĉiam celas la bona verkisto!

Komprenigi al multnombraj homoj tion, kio ŝprucis el lia koro, *traduki ideojn*, ne simple vortojn, jen la tasko, kiun prenis sur sin D-ro Zamenhof en la ĝojo kaj doloro de la kreado. Ĉar tiel li komprenis sian taskon, li povis nur forĵeti ĉian sistemon *a priori*, kiu malproksimigus lin de la celo; li plie — ne nur sperta gramatikisto kaj poligloto, sed «apostolo» — devis eltrovi ion tute alian, ol simple lertan kombinaĵon de vortoj kaj de gramatikaj formuloj, ion tute alian, t. e. lingvon, idon de ideo, posedantan propran ekziston, propran animon, *vivantan lingvon*.

Jen, kvankam la lingvo estas rimarkinda laŭ aliaj ecoj, la vera fonto de ĝia tuta forto, jen kial kontraŭ ĉia alia sistemo ĝi konservis kaj konservas sian superecon.

Sed ĉu el la konstato de tiu ĉi fakto rezultas, ke, por la Esperantistoj, estas nepra devo akcepti de tiu, kiun ili nomas: «Majstro», ion alian ol la

lingvon mem, kiun li donis al ili? Ne, tute ne! D-ro Zamenhof deklaris insiste, ke «Esperantistoj estas ĉiuj, kiuj scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale, por kiaj celoj ili ĝin uzas». Se, laŭ deveno, Esperanto ne estis neŭtrala lingvo, t. e. lingvo indifera al ĉia ajn socia politika aŭ religia koncepto, tia ĝi fariĝis fakte kaj laŭ la konsento mem de ĝia aŭtoro. Eĉ, se la animo ŝanĝiĝus aŭ ŝanĝiĝis, tio nenion forprenis el la forto de la lingvo: *la vivon ĝi konservas*, kiun ĝi ricevis je sia naskiĝo.

Cetere laŭ alia vidpunkto ankaŭ Esperanto estas tre vivanta lingvo. Ĝi estas nun legata, skribata, eĉ parolata de multe pli da homoj, ol kelkaj aliaj vivantaj lingvoj aŭ dialektoj; ĉiuj kiuj ĝin uzas, malgraŭ la diverseco de la naciaj lingvaĵoj, uzas ĝin same.

Oni riproĉis al Esperanto, ke ĝi estas *artefarita lingvo!* Sed ĉiuj niaj civilizitaj lingvoj estas en tre alta grado artefaritaj kaj fariĝas tiaj ĉiam pli kaj pli sub la potenco influo de la inteligenta volo. *Inter Esperanto kaj la tiel nomataj «naturaj» lingvoj la diferenco estas ne je naturo, sed nur je grado.*

Esperanto estas komuna lingvo, kiel estas ĉiu literatura lingvo aŭ, pli ĝuste, la lingvo uzata de la kulturitaj klasoj interne de la landoj, kiuj uzas saman lingvon; sed Esperanto estas komuna inter popoloj, kies lingvoj estas tre diversaj. Tie kuŝas certe la sola vera danĝero por internacia lingvo, kiu riskas, sub la nacilingvaj influoj, difektiĝi kaj disfali en dialektojn. Sed, ĉar Esperanto estas lingvo precipe legata kaj skribata, lingvo por *ĉiu la dua*, sekve lernita, ne tre verŝajna estas la naskiĝo de dialektoj. Cetere la Esperantistoj antaŭvidis la danĝeron kaj ĝin kontraŭstaris per la kreo de Lingva Komitato kaj Akademio, kies ĉefa, se ne sola tasko estas: konservi la unuecon, komunecon, purecon de la lingvo, akceptante novan vorton, novan esprimmanieron nur, kiam ne kontraŭfundamenta, ĝi estas jam internacie komprenata kaj sufiĉe ĝenerale uzata.

La Esperantistoj estas konvinkitaj, ke ili venkos ĉiujn mokojn de la nesciuloj kaj ĉiajn malfacilaĵojn, kiujn ili survoje renkontas. Ili posedas multajn gazetojn kaj revuojn; ili havas malantaŭ si jam tre riĉan, tre diversan literaturon, kiun ili severe konservas al sia fundamenta libro, la «Fundamento», kie D-ro Zamenhof, por tiel diri, koncentrigis sian lingvon: *tradicion* ili do jam havas. — Multaj internaciaj kongresoj pruvis plie la praktikan taŭgecon de ilia lingvo, kiel parolata lingvo, kiel oratora lingvo.

La esperantistoj ne diskutas pri sia lingvo; ĝin ili uzas. Ili ne dubas, ke fine ĝi enpenetros en la ĝis nun plej malfavorajn mediojn, tial ke utila al ĉiuj, ĝi estas al neniuj malutila. Respektante la naciajn lingvojn, kies purecon ĝi fakte ŝirmas, Esperanto ofendas neniun respektindan senton.

La firmeco de ilia konvinko, de ilia sintenado estas forto kaj garantio de ĉi ĉi sukceso.

Th. Cart,
Profesoro ĉe la Alta Lernejo
pri Politikaj Sciencoj

*: 2 Cours Pratique d'Esperanto, préface de M. Th. Cart, Librairie Centrale Esperantiste, 51, rue de Cléchy, Paris. La lernolibro nun estas presata. Red.

Paĝo por lernantoj = Pàgina per a alumnes

La personoj, animaloj kaj aferoj, kies nomoj estas, Les persones, animals i coses, de les quals els noms són substantivoj, kaj estas montrataj en esperanto per finiĝo o substantius, i són indicats en esperanto per la terminació o en ununombro kaj *oj* en plurnombro, *estas*: staras, sidas, en singular i *oj* en plural *són*: estan drets, seuen, kuŝas, ŝajnas, aspektas, ripozas, dormas, falas, scias, jeuen, semblen, semblen, reposen, dormen, cauen, saben, konas, volas, sentas, pensas, ĝuas, suferas, ridas, coneixen, volen, senten, pensen, gaudeixen, sofreixen, riuen, ploras, vivas, mortas k. c. La personoj, animaloj kaj aferoj ploren, viuen, moren et cetera. Les persones, animals i coses ankaŭ *agas*: venas, iras, laboras, supreniras, malsupreniras, també *obren*: vénen, van, treballen, pugen, baixen, eniras, eliras, parolas, skribas, legas k. c. Kiam homo entren, surten, parlen, escriuen, llegeixen et cetera. Quan un home manĝas, estas manĝanta; io: viando, fiŝo, frukto estas menja, està menjant; quelcom: carn, peix, fruita és manĝata. Mi trinkas akvon: akvo estas trinkata de mi. menjat. Jo bec aigua: aigua és beguda per mi. Hierau mi diris multajn aferojn. Mi estas dirinta aferojn: aferoj Ahir jo vaig dir moltes coses. Jo he dit coses: coses estas diritaj. Morgau mi vidos vin: mi estas vidonta vin: vi són dites. Demà jo veuré a V.: jo he de veure a V.: V. estas vidota de mi. Edžo amas edzinon kaj edziha d'esser vist per mi. Un marit estima la muller i una mune amas edzon. Ambaŭ estas amantaj kaj amataj. Ni ller estima el marit. Ambdós són amants i amats. Nosaltres lernas Esperanton: esperanto estas studata de ni. aprenem Esperanto: esperanto és estudiat per nosaltres. Mi deziras peti, paroli, komenci, ekzerci, diri, vivi, Jo desitjo demanar, parlar, començar, exercir, dir, viure, vidi, aŭdi, havi, esti. Ĉiuj verboj en esperanto estas regulaj veure, oír, haver, ésser. Tots verbs en esperanto són regulars kaj finiĝas en infinitivo per *i*, por pasinta tempo per *is*, pasanta i acaben a l'infinitiu en *i*, per passat temps en *is*, present per *as* kaj pasonta per *os*. Nun mi studas, hierau mi studis, en *as* i futur en *os*. Ara jo estudio, ahir jo estudiava, morgau mi studos. demà jo estudiaré.

Fajreroj

Radio-Genève estas fondita. — En la gazeto Esperanto de U. E. A. estas informite ke la radiostacio en Genève funkcias. Ĉar ĝi estas regiona stacio, la komitato sin turnis nur al la svisaj samideanoj, kiuj promesis aĉeti akciojn. Por ke la stacio povu esti bone prizorgata kaj oni baldaŭ estu kapabla mendii pli potencajn stacion, la eksterlandaj promesintoj tamen estas petataj jam nun subteni la gravan entreprenon. — Ni vere gratulas U. E. A. por tiu nova kaj grava sukceso de Esperanto, kaj rekomendas al ĉiuj samideanoj ke ili helpu plej malavare por subteno kaj pligravigo de la Esperanto-Radiostacio kiu certe estos baldaŭ la Internacia Radiostacio de Eŭropo.

Avertu al K. E. F.-grupoj. — Ni petis letere de ĉiuj ke ili bonvolu sendi al ni plej baldaŭ la plenan liston de la respektivaj geanoj por publikigo en en la Kongreslibro de Palma. Ni tre bedaŭras ke ankoraŭ kelkaj ne plenumis nian peton, kaj tiel ili prokrastigas la presigon de la Kongreslibro. Tiuj Grupoj, kiuj ne estos sendintaj al ni sian liston antaŭ la 25 de aprilo, ne povos aperi en la Kongreslibro, kaj tio malfavoros ilin kaj nian movadon.

Charles Richet. — Antaŭ kelkaj tagoj nia fama samideano honoris Barcelona per sia ĉeesto. Li invitis nian prezidanton partopreni la Konferencon, en kies organizo li efike laboras en Parizo.

Estas tre agrable al ni sciigi ke kelkaj s-anoj fondis en Barcelona «RADIO TELEFONIA ESPERANTA RONDO», kies sidejo estas ĈAN MORITZ (Placo Sepúlveda). La kunvenojn ordinare ĉeestas niaj konataj fervoraj samcelanoj kaj amikoj Dro. Bartomeu, Dro. Bremon, Sroj. Grau, Domènech, Dalmau, Paluzie, Valdepeñas kaj aliaj ne malpli entuziasmaj ol tiuj. Oni bonakceptos esperantistojn dezirantajn la sukcesigon de Esperanto en Radio-sfero.

Ni informas ke «Esperanto-Servo» fondiĝis en urbo České Budejovice, Zizkova str. 6, Ĉeĥoslovakujo. Ĝi donas informojn senpage ĉiun Esperantiston pri komercaj, negocaj, industriaj, socialaj, k. t. p. demandoj, koncernaj al dirita lando; vendas Esp. librojn de tutmonda literaturo, Esp. gazetojn; liveras unuakvalitajn emajl-kuirvazaraĵojn kaj propagandajn Esp. kraĵojn kaj cetere. La priservado estos efektiva ĉiam ĝuste, precize kaj tre kontentige.

Pretigu la Flagojn. — Ni rememorigas al esperantistoj kiuj kongresos en Palma ke ili ne forgesu kunporti la respektivan esp. flagon de sia grupo, okaze de tiea manifestacio. Ni devas forte impresi la Palman publikon.

Experimental Wireless. — La tiel fama radio-gazeto, dezirante montri sian praktikan intereson pri Esperanto, publikigas en siaj paĝoj artikolojn en aŭ pri nia lingvo. Ĝi intencas, se ĝi ricevos sufiĉan subtenon, rezervi unu aŭ pli da paĝoj en ĉiu eldono por teknikaj artikoloj en Esperanto, tiel ke, la gazeto, kvankam presita preskaŭ tute anglalingve, interesos senfaden-amantojn ĉiulandajn. «Experimental Wireless» aperas je komenco de ĉiu monato, kaj estas legata de seriozaj eksperimentistoj. Oni opinias, ke ĝi estas la plej bona radio-gazeto eldonita.

Ni ricevis la februaran numeron, kiu enhavas 5-paĝan Esperantan-Anglan Radio-Vortaron. Tiun artikolon kaj la antaŭe aperintajn kontribuis S-ro Harry A. Epton, Honora Sekretario de la Internacia Radio-Asocio.

La eterne reformema Antido. — Jen la reformo akiris la nomon Esperantido. Post kelka tempo oni nomis ĝin Esperantida kaj nun oni baptis ĝin denove kaj fariĝis Nov-Esperanto. Ni solene promesas ke ni alprenos la reformon de Antido, kiam ni serioze povos pripensi, ke la reformo kaj nomo estas la lasta. Ni estu certaj, ke ni neniam ĵurrompos kaj samtempe povos esti fidelaj fundamentanoj.

Unua laborista olimpiado Frankfurt am Main. — 24-28 julio 1925. Depost multaj jaroj la «Unio internacia por fizika eduko» (2-a kongreso) estas akceptinta nian lingvon kiel sian internacian korespondlingvon kaj decidis praktike uzi ĝin dum la unua laborista olimpiado okazonta en Frankfurt am Main.

Niaj samideanoj en la nomita urbo alvokas la diverslandajn esperantistajn olimpianojn por ke ili anoncu sian partoprenon al la Esperanto-Fako, Eckenheimerlandstrasse 97, Frankfurt am Main (Germanujo).

Ĉielarko. — Lastatempe ni fanfaronis, ke ni estas flavaj, ruĝaj, k. t. p. Jen alia esperantisto skribis al ni, ke ni estas *separatistoj*, ke ni prezentas Katalunuojn subpremita nacio. Ĉu oni baldaŭ kulpigos nin, ke ni vendas batalilojn al la maŭroj? Ni tremas kaj tremas, neniam laciĝas pri l' saĝuloj (?) ĉieaj pensante.

Travestio. — Ĉu vi pagis vian kotizaĵon al K. E. F.? Se jes, dormu trankvile, se ne, ni certe dormiĝos kaj poste kun larmoj disreviĝos. Kion vi povas hodiaŭ fari, faru kaj la vojon al ni ne baru. (Ni malpermesas la represigon de la ĵusbakita nova proverbo).

Radiotelefonia kaj ĵurnalaj kursoj de Esperanto estas gvidataj de niaj kamaradoj Artur Domènec kaj S. A. T-anoj, en «Radio Barcelona» kaj «Acción Social Obrera» el St. Feliu de Guixols. Vere grava por nia Movado estas la tasko de niaj amikoj.

Nia malnova grupo «Paco kaj Amo» vikle laboras, pruvo estas, la multnombra ĉesto en la kursoj kiujn ĝi subtenas sub la gvido de S-noj J. Alberich kaj L. Domènec, kaj la paroladoj; pasintan monaton paroladis sinjoroj

Delfi Dalmau kaj Jaume Grau, la unua pri Esperanto kaj Radio kaj la lasta pri Esperanto kaj Literaturo; certe tiuj paroladoj inokulis entuziasmon al la novaj lernantoj ĉar ili majstre disvolvis tiujn temojn.

La potenco radia stacio W C C O (Duobla Vo, Co, Co, O), ĉe Minneapolis kaj Sankta Paŭlo, Usono, dissendos Esperantan Programon de la 23a ĝis la 24a horo, centra tempo (90a meridiano), vendredon, la 24an de Aprilo. Sur la meridiano de Greenwich estos de la 5a ĝis la 6a horo, sabaton, la 25an de Aprilo. La potenco estos kvin kilovatoj kaj la ondlongeco 417 metroj. La programo estos koncerto kun anoncoj esperantaj, parolado esperanta kaj esperantaj kantoj. — Ĉiun esperantiston, kiu legas tiun ĉi avizon, oni urĝe petas plenumi tri devojn. — Unue: ke li penu, aŭ per sia ricevaparato aŭ per ricevaparato de amiko, ricevi la programon, kaj nepre skribu al Gold Medal Station WCCO, Minneapolis, Minn., Usono, pri sia sukceso aŭ malsukceso, priskribante la tipon de ricevilo; — Due: ke li petegu al la Lokaj kaj landaj ĵurnaloj esperantaj ke ili represu tiun ĉi avizon; — Trie: ke li influu la ĵurnalojn kaj precipe la radiajn ĵurnalojn ke ili donu kiel eble la plej grandan publikecon al la tutmonda penado. — Ni montru kia vasta estas Esperantujo.

La pagoj por K. E. F. — Por faciligo ni pretigis akceptejon de pagoj de jarabonoj de nia gazeto (ses pesetoj en Iberio kaj Amerikaj landoj, kaj ses svisaj frankoj aŭ egalvaro en la ceteraj) kaj aliĝoj de grupoj kaj individuoj al la Kataluna Esp. Federacio, en la adreso de la Prezidanto, Carrer València, 245, Barcelona.

Servoj de K. E. F. al la Grupoj. — Gazetoj Esperantistaj el ĉiuj nacioj estas sendataj de nia Federacio al la Grupoj por sciigo al ĉiuj niaj samideanoj pri la tutmonda batado de nia Movado. Okaze de novaj kursoj aŭ aliaj motivoj la Grupoj organizu propagandajn paroladarojn kaj ekspoziciojn, por kio la K. E. F. estas preta plenumi petojn pri oratoroj kaj konsiloj.

Vi povas aĉeti nian gazeton ĉe la Barcelonaj grandaj librejoj «Catalonia», Plaça Catalunya, 17; «Nacional i Estrangera» Rambla Catalunya, 72, kaj, «Italiana» Rambla Catalunya, 125. Ĉi-tiu numero de K. E. kostas 50 pesetajn centimojn. — Petu ankaŭ esperanto-librojn kaj ĵurnalojn en tiuj Librejoj por ke ili interesigu pri esperantaĵoj.

Ekzamenoj pri lernado, kapablo kaj profesoreco, en Palma de Mallorca. — Dum nia proksima Kongreso en Majo, ni okazigos ekzamenojn por aljuĝo de atesto al la esperantistoj kiuj pruvos tra ekzameno ke ili konas profundete, profunde aŭ profundege la gramatikon kaj la internacian lingvon. Ni, do atentigas ĉiujn kursanojn kaj jam lertajn gesamideanojn, ke ili pretigu por atingi de atesto. — Por pruvo de «lernado» de gramatiko kaj Esperanto sufiĉas freŝa kaj konscia lerninteco de la «Gramàtica» (curs mitjà)

de Pompeu Fabra, kaj de la «Ekzercaro» de la Zamenhofa Fundamento. Por pruvo de kapablo estas ankaŭ necesa la kono de «Esperanta Sintakso» de Paul Fructier. Kaj por pruvo de profesoreco estas ankaŭ necesa la kono de «Lingvaj Respondoj» de Zamenhof kaj «Converses Filològiques» de Pompeu Fabra. — Bonaj helpaj libroj estas la vortaroj «Esperanto-Català» kaj «Català-Esperanto» kaj la «Gramàtica Raonada d'Esperanto», de F. Pujulà i Vallès, la vortaro Kabe kaj la «Oficiala Klasika Libro de Esperanto, kolekto de la Akademio, eldonita de Esp. Centra Librejo, 51, Rue Clichy, Paris (9e.).



Libera Rubriko

Al la gvidantoj de U. E. A.

En la lasta numero de «Kataluna Esperantisto» unufoje aperis reklamo pri U. E. A. En tiu sama numero aperis ankaŭ sciigo pri la decido de la Komitato de U. E. A. daŭrigi la sisteman neuzon de la sufikso *uj* por landnomoj, malgraŭ la peto de la Prezidanto de la Lingva Akademio reveni al la uzado, laŭ la Zamenhofa tradicio, de la sufikso *uj*, samtempe kun la formo *lando* kaj la internacia finajo *io*.

Nu, mi devas diri ke por mi la tuta forto de la reklamo pri U. E. A., sur la kovriloj de «Kat. Esp.», estis nuligata de la samtempa sciigo ke U. E. A. ALMENAŭ malatentas la konsilojn de la Prezidanto de la Akademio.

Mi volas atentigi la gvidantojn de U. E. A. pri tio, ke la *celo* de ilia asocio estas nur *praktika*; do ili devas labori por Esperanto nur en la *praktikaj* aferoj kaj ne devas preni sur sin la taskon plibonigi aŭ reformi la lingvon. Estas vero, ke ĉiu esperantisto individue povas kontribui al la evoluigo de la lingvo, sed pri tio ne devas zorgi *oficiala asocio* kiu jam havas sian difinitan *praktikan* celon. U. E. A. laboru en sia propra kampo (kie estas jam sufiĉa laboro) kaj lasu al la lingvaj institucioj kaj al la lingvistoj kaj literaturistoj ĝenerale la prilingvajn zorgojn. Pri praktikaj aplikoj de Esperanto, U. E. A. havu plenan liberecon; sed ĝi ne tuŝu la lingvajn demandojn, por kiuj ne estas sufiĉe preparitaj la gvidantoj de U. E. A. — simple praktikistoj kaj organizantoj.

La nunaj gvidantoj de U. E. A., malgraŭ siaj meritoj en aliaj aspektoj, estas kulpaj pri lingva maldisciplino, ĉar ili persiste evitas formojn plene Fundamentajn kaj pli persiste ankoraŭ uzadas formojn malrekomenditajn de la Lingva Akademio. Se ili ne plenumas la *devon* respekti la lingvon, ili ne rajtas aljuĝi al ĉiu esperantisto la *devon* aliĝi al U. E. A.

Kiam U. E. A. ne plu miksiĝos en lingvajn aferojn, ĝi ne bezonos fari tion da reklamoj por plikreskigi la nombron de siaj membroj.

JAUME GRAU CASAS
eks-Direktoro de «Kat. Esp.»

L'ESPERANTO A' COP D'ULL

ALFABET. -- A, b, c (ts), ĉe (tx), d, e (é), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (y), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima sil·laba (paraules plures)

LA
article determinatiu

el, els
la, les

J
(sona y:
i es terminació del plural

faktoj, manoj
okuloj, animoj

IN
sufix a formar
el femeni

heroino, reĝino
katino, leonino

O
terminació
substantiu

lakto
urbo
komerco
(comerc)

A
terminació
adjectiu

blanka
antikva
komerca
(comercial)

I
terminació verb
(infinitiu)

kompreni
labori
komerci
(comerciar)

E
terminació
adverbial

klare
konstante
komerce
(comercialment)

CONJUGACIÓ DEL VERB

	AS temps present	IS temps passat	OS temps futur	US mode condicional	U mode imperatiu o subjunctiu
Mi	skribas	skribis	skribos	skribus	skribu
Jo	escric	escriví	escriuré	escriuria	escrigui

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti*, i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita

DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En esperanto, tota paraula que rep l'acció d'un verb (complement directe) acaba en **N**.

Li vidas min. Ell em veu.
Mi vidas lin. Jo el veig.

Mi skribas la leteron. Jo escric la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius és expressada per mitjà de les preposicions *at*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

Al la patro, per la plumo, sur la tablo.

ATENTU, LEGU, KOMPRENU:



Nur maŝinskribitaj manuskriptoj sur unu flanko de ĉiu paperfolio, ĝenerale korektaj en kataluna aŭ esperanta lingvoj estas akceptotaj

Ĉu akceptitaj aŭ ne, originaloj neniam estas resendotaj

«Deklaracio pri Esperantismo» — (Akceptita de la Unua Kongreso, en sia lasta kunsido) — Ĉar pri la esenco de la Esperantismo multaj havas tre malveran ideon, tial ni subskribintoj, reprezentantoj de la Esperantismo en diversaj landoj de la mondo, kunvenintaj al la internacia Kongreso en Boulogne-sur-Mer, trovis necesa laŭ la propono de la aŭtoro de la lingvo Esperanto doni la sekvantan klarigon — 1 La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu «ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniam celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn», donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigitaj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia Esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure privata por kiu la Esperantismo ne respondas»

El «Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia» — «Fundamenta Krestomatio» — Per si mem la lingvo internacia ne sole ne povas malfortigi la lingvojn naciajn, sed kontraŭe, ĝi sendube devas konduki al ilia granda fortiĝado kaj plena ekflorado: dank' al la neceseco ellernadi diversajn fremdajn lingvojn, oni nun malofte povas renkonti homon, kiu posedus perfekte sian patran lingvon, kaj la lingvoj mem, konstante kunpuŝiĝante unuj kun la aliaj, ĉiam pli kaj pli konfuziĝas, kripliĝas kaj perdas sian naturan riĉecon kaj ĉarmon»